

POLA ESPERANTISTO

JARO XXII. * DECEMBRO 1928. * N-o 12.



ROK XXII. * GRUDZIEN' 1928. * Nr. 12.

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—. duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—.

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

ANONCOJ:

1 strona	Zł. 60.—	1 paĝo	Zł. 60.—
1/2 strony	„ 32.—	1/2 paĝo	„ 32.—
1/4 strony	„ 17.—	1/4 paĝo	„ 17.—
1/8 strony	„ 10.—	1/8 paĝo	„ 10.—

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON.

**ABONU MEM KAJ VARBU ANKAŬ ABONANTOJN POR LA SOLA
ESPERANTA GAZETO EN POLLANDO!**

I. NIAJ REPRESENTANTOJ EN ANVERS, BIAŁYSTOK, KATOWICE, PARIS KAJ
WARSZAWA.

Ni atentigas niajn ŝ. gelegantojn, ke ni donis reprezentandon de nia revuo en Anvers al S-o J. Fechter Rue Sommers 49, en Białystok al „Esperanta Societo Zamenhofa“. Kupiecka 49, en Katowice al „Societo de Esperanto Amikoj“, en Paris al s-o Salo Grenkamp, rue de Vaugirard 4 en Warszawa al „Pola Studenta Esperantista Societo“ Leszno 99 m. 5. Bonvolu do aboni, pagi anoncojn, mendi librojn kaj gazetojn ktp. pere de niaj reprezentantoj.

TREŚĆ — ENHAVO:

Dr. J. Mędrkiewicz (Lublin): Czy Esperanto jest językiem żywym? (dokończ.). — Witold Giełżyński: Interna situacio de Polujo. — Halina Weinsteinówna: Deko datreveno de l' sendependeco de Polujo. — Wacław Grubiński, Trad. Br. Kuhl: Si (novelo). — Tadeusz Hodakowski: Pola kristnaska kanto. — El la polaj kristnaskaj kantoj (trad. Wład. Trzeciak). — Anna Dobrzycka: De kie devenas la kurtimo ornami la kristnaskan abion. — Jan Kostecki: Esperanta vivo en Parizo. — Dr. Ant. Czubyński: List otwarty. — Pollanda-Kroniko. — Tejot (Przemysł): Kronika zagraniczna. — Administraciaj Sciigoj.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXII. JARO.

KRAKÓW
GRUDZIEŃ 1928 DECEMBRO

Nr. 12 N-o.

CZY ESPERANTO JEST JĘZYKIEM ZYWYM?

(Dokończenie)

W ten sposób dana została odpowiedź na pytanie pierwsze, czym jest język.

Pozostaje pytanie drugie, jak rozumieć pojęcie „żywy”.

Ściśle biorąc, żywym może być tylko organizm biologiczny. Żywy organizm charakteryzuje się zdolnością rozwoju, względnie utrzymania swej formy w żywocie jednostkowym lub gatunkowym. Z tego założenia wychodząc, czy można nazwać język zjawiskiem indywidualnie żywym? Nie. Język, każdy język, jako system sygnalizacji akustycznej i wzrokowej nie jest zjawiskiem żywym, jest zjawiskiem ruchu fizykalnego. Dlaczegoż więc tak powszechnie daje się słyszeć zdanie, że języki naturalne są żywe, rozwijają się, rozrastają itd.?

Ta sprzeczność da się wytłómaczyć. Zachodzi tu bowiem pomieszanie pojęć. Język, jako system sygnalizacji jest martwy, lecz ta całość socjologiczna, której podstawą i rusztowaniem jest język, a więc ten twór biologiczny najwyższego rzędu na ziemi, twór zbiorowy, twór niezmiernie skomplikowany, wewnątrz którego poszczególne ludzkie indywidua są wbudowane tak samo, jak pojedyncze komórki wbudowane są w obręb pojedynczego organizmu żywego, ten twór jest żywy i nazywa się narodem, względnie cywilizacją danego narodu. Świat dzisiejszy jest podzielony na wiele takich twórow, i obok cywilizacji ogromnych, potężnych, znajdują się narody małe i cywilizacyjnie pierwotne.

Po powyższych wywodach odpowiedź na postawione w tytule pytanie nasuwa się już sama.

Język Esperanto jako system dźwiękowej czy wzrokowej sygnalizacji jest martwy, również jak każdy inny język narodowy. Żywymi są tylko te socjologiczne twory, które, budując się na języku, rozwijają i doskonalą swój język.

Mniemanie publiczne, które nie sięga do głębi istoty rzeczy, nie dostrzegając tworu głównego i żywego, a idąc za zasadą pars pro toto, popularnie mianuje języki jako żywe, wzamian, by mianować żywymi narody, do których języki należą.

Dr. J. Mędrkiewicz (Lublin).

INTERNA SITUACIO DE POLUJO.

La tasko de l' nova pola ŝtato kunfandi en unu tuton la tri partojn, el kiuj ĝi estis rekrea, estis kompreneble tre malfacila. Ĉiu el la tri partoj, kiu ja pli ol 100 jarojn estis subigita al fremda regado, posedis alian leĝaron kaj alian strukturon politikan kaj socian, kaŭzitajn de diversaj ekonomiaj sistemoj. Hodiaŭ tiu laboro jam tiom progresis, ke la frotsupraĵoj inter la tri partoj aŭ malaperis aŭ almenaŭ tre mildiĝis.

Ankaŭ la problemo de l' naciaj malplimulto, kiu danĝere minacas pro fremdlandaj influoj, evidente malfortiĝis. La kontentiga ordigo de l' lingvaj kaj lerneja problemoj de l' alilingvaj popoloj, plibonigita administrado de l' limteritorioj kaj la mildigo de l' mizero per materiala subteno en regionoj milite ruinigitaj malhelpis kreskadon de tiuj minacaj naciaj influoj.

En la okcidentaj regionoj kun forta germana enmigrintaro tiu ĉi problemo ne estis tro grava, ĉar la antaŭa dependeco al Prusujo enpenetrigis al ĝiaj civitanoj tian respekton por la aŭtoritato de l' ŝtato kaj krom tio la demando de malplimulto tie estis solvita per la internaciaj traktadoj, ke la naciaj separatistaj inklinoj en Silezio kaj Pomorze neniam estis danĝeraj. Koncerne la judan loĝantaron dissemiitan tra la tuta lando, ĝi ne havas kaŭzon por malkontenteco, ĉar ĝia situacio evidente pliboniĝis kompare kun la rilatoj dum la fremda regado.

Kiel resumon de l' dekjara laborado oni povas konstati, ke la administradon ekregis diversaj inklinoj de apartaj partoj kaj popoloj. Intertempe aperis nova krizo, kiu ekposedis la organismon de l' lando. Ĝia kaŭzo estis la nematureco de l' popolo por la nova demokrata regadsistemo. La plej granda parto kune kun la metropolo Warszawa tute ĝin ne konis; ĝiaj loĝantoj povis labori en la politiko maksimume konspiracie, estis do por la gvidado de l' ŝtato plene nepreparita. Pli granda estis la politika vivo malgraŭ la unuflanka inklino de aŭtoritataj unuoj en la prusa Polujo. La plej preparita estis la aŭstria regiono, kvankam la Wien'aj kutimoj kaj influoj ne estis tute imitindaj. Pro tio estis kompreneble, ke ĝuste Galicio (aŭstria Polujo) liveris al Warszawa plimulton da oficistoj kaj parlamentanoj.

Tiuj mankoj de Wien'a parlamentismo baldaŭ montriĝis. En la centralista ŝtato de Habsburgoj la deputitoj estis al kutimigitaj ne kunlabori por la bono de l' tuto, sed agi nur por sia propra malgranda regiono. Laŭ tiu ekzemplo ili kun malmultaj esceptoj anstataŭis siajn privatajn interesojn, se ne tiujn de siaj familioj, do almenaŭ de la ĉirkaŭaĵo, de sia vilaĝo, sia komunumo, sia distrikto, en la plej bona okazo de sia metio, kiu ilin elektis. Preskaŭ ĉiuj interpelacioj amase direktataj al la registaro koncernis preskaŭ sole malgravajn lokajn cirkonstancojn. Ankaŭ konstante trudi sin la deputitoj al la oficejoj — komencante de la ministroj kaj finante ĉe la distriktestroj — kaj zorgis pri la intereso de siaj elektintoj.

Tiuj rilatoj elvokis la kritikon de pli serioze pensantaj rondoj, kiuj opoziciis al Sejmo (parlamento) kaj fine kaŭzis la okazaĵojn en

majo 1926, dum kiuj Marŝalo Piłsudski per armiloj rompis la superregadon de Sejmo. De tiu tempo datumas interesa periodo de batalo inter la leĝdona korpo kaj la ekzekutiva forto. Samtempe okazis ŝanĝoj en la rilatoj de politikaj partioj al Piłsudski. Antaŭe li povis sin apogi je konfido de l' maldekstrumo kun akra kontraŭstaro de dekstrumaj partioj. Iom post iom li akiras amikojn en ĉiuj partioj. La bienhavaj partioj estas esence konservativaj, tamen ankaŭ ili alproksimigis sian programon al la Marŝalo; kvankam la demokratoj kun sia programo tenas sin konstante malproksime de tiu de Piłsudski, oni devas tamen konfesi, ke ankaŭ inter ili li havas sindonajn amikojn. Tiu ĉi fermento havos kiel sekvon iom post ioman aligrupigon de partioj kaj ilian saniĝon.

Tute ne dezirante esti profeto oni devas konstati, ke la juna ŝtato troviĝas en la ŝtato de interna renaskiĝo. Estas tamen ekskluzigite, ke la ŝanĝoj povu skui la fundamentojn de la ŝtato. La monarkismo havas amikojn nur en malmultaj rondoj aristokrataj kaj ne reprezentas iun forton moralan aŭ materialan; faŝistajn tendencojn oni rimarkinde trovas egale inter la plej fervoraj partianoj de Piłsudski kaj liaj plej akraj malamikoj dekstrumaj, kio kompreneble tute ekskluzivigas ilian plifortiĝon. Tial al la demokrata kaj republikana organizo de l' ŝtato minacas nenia danĝero. Ne estas tamen ekskluzigita la rompo de parlamenta sistemo kaj similiĝo al la amerika sistemo de regado. Jam dum la lasta balotado de sejmdeputitoj (februaro 1928) oni multe parolis pri la fortiĝo de l' pozicio de la Ŝtatprezidanto, pri lia elektado ne per la leĝdonaj ĉambroj, sed per la tuta popolo, pri la submeto de ministroj ne al la parlamento, sed al la prezidento kaj pri la dono de l' rajto pri iniciativo en la leĝdonado al la prezidento.

Malfacile estas diri, ĉu tiuj postuloj trovos plimulton en la nuna sejmo, kies ĉefa tasko estas la revizio de l' konstitucio. Ĉiuokaze la socialistaj kaj radikalaj partioj forte batalas kontraŭ tiuj novaĵoj kaj obstinas por pura parlamentismo.

La malpaco inter la parlamento kaj la registaro, en kiu hodiaŭ temas pri la trouzoj de l' parlamento, povos morgaŭ pligrandiĝi — ĝia temo estos: prezidento aŭ parlamento.

Por la pola popolo, al kiu la politika agado ĝis nun estis preskaŭ fremda, tiuj politikaj frotadoj pro la konstitucia formo de l' ŝtato estas tre bona lernejo de l' politika vivo. Ĝi lernas ŝati la civitanajn rajtojn kaj konstituciajn leĝojn, kiujn ĝi tiel subite ricevis. La ĝisnunaj malpacoj kaj la batalo pri la revizio de l' konstitucio pligrandiĝas ĝian konstitucian konscion. Ĝi alproprigas al si la konojn pri la rajtoj de libereca civitano, kiuj al la okcidenteŭropaj popoloj estas delonge tute kompreneblaj.

Witold Giełżyński.

DEKA DATREVENO DE L' SENDEPEN- DECO DE POLUJO.

La tago de la deka datreveno de l' Sendependeco de Polujo restos longjare en memoro de Varsovianoj.

Tio estis festo tiel solena, tiel ĝojplena, kiun ni neniam ankoraŭ travivis. Tio estis la festo de griza, sennoma popolo, kiu en nekalkulebla aro amase eliris sur ĉefajn stratojn, atente rigardante preterirantajn militistojn; tio estis la festo de militisto, kiu per propra sango akiris liberecon de patrujo, kaj kiu kun rideto sur buŝo povis pretermarŝi antaŭ sia amata Estro — Józef Piłsudski. La ĉefaj stratoj de Varsovio ŝanĝiĝis en grandan salonon de la ĉefurbo. Ĉie amasoj da felica, ĝoja publiko.

Kaj kiam vespere ekflamis Varsovio per miloj da brilaj elektraĵoj lampetoj, kiam komencis pretermarŝi aŭtomobiloj, plenigitaj de diverskolora alivestita junularo kaj, kiam ĝi komencis ĵeti paperajn rubandojn kaj confetti'on sur popolamasojn, tiam la publiko ekregis la stratojn.

Dancoj, kantoj, ĝojkrioj sur placoj!

Kaj super ĉio bela, stelriĉa ĉielo.

Ĝis malfrua nokto daŭris tiu-ĉi „venezia karnavalo“, la unuan fojon organizita en nia urbo, la senzorga humoro, la senlima ĝojo.

La krioj „Vivu“ kaj tiu-ĉi ĝojo, kiu resonis eĉe tra tuta pola tero de Bałtyk ĝis Karpatoj, tio estis la sola rekompenco por Tiu, kiu revivigis Sendependan Polujon, kiu oferis por patrujo sian vivon — Józef Piłsudski. Kaj malgraŭvole dum tiu-ĉi ĝojo kaj bruo mi pense reŝiĝis al tempoj, kiam el ĥaoso de mondmilito komencis eliĝi Polujo, kiam post trijara batalo la Koalicio igis la aferon de Polujo kiel unu el ĉefaj celoj de mondmilito, kiam en fino de milito vidiĝis impona persono de Wilson, kiu deklaris Polujon sendependa ŝtato kun aliro al maro.

Antaŭ miaj okuloj tramarŝis dekmiloj da polaj militistoj, batalantaj en diversaj armeoj por nacia afero, — dekmiloj da militistoj, kaŝintaj siajn standardojn tiel longe, ĝis eksonis la Horo de Libereco.

Venis fine la tago de gloro, de heroeco, de forto kaj de kuraĝo, la tago en kiu restariĝis Polujo.

Tiun tagon atendis polaj civitanoj cent jarojn: jen tuta popolo, kvazaŭ je unu ordono konkorde kreis Forton, kiu fariĝis bazo de Venko.

Vek-signaloj al tiu-ĉi aĝo estis la novaĵo, rapide trakuranta polan teron, ke revenis Varsovion el Magdeburg Józef Piłsudski.

En tiu-ĉi vorto enhaviĝis ĉio: kredo, potenco kaj venko.

Baldaŭ post la novembraĵoj tagoj estis kunvokita Pola Parlamento, kreita laŭ demokrataj bazoj. La unuan fojon en pola historio la kamparanoj kaj laboristoj ricevis sidon kaj voĉon en parlamento, la unuan fojon pola virino ricevis egalrajtecon.

Venis sanga batalo kun bolŝevikoj, invadintaj la landon kaj kiuj devis poste retiriĝi.

Polujo ne volas per armilo batali!

Ĝi pruvis sian paceman inklinon per vigla partopreno en laboraj de Ligo de Nacioj, sub kies decido ĝi donis gravajn, landajn aferojn.

Jen ĝia vidpunkto en 1924 j. en Genevo dum konferenco je „geneva protokolo“, jen propono de pola Estraro en 1927 j. mallaŭdi ĉian militon, kiu estus finonta internaciajn konfliktojn.

Kaj nuntempe Polujo marŝas antaŭen pace kaj labore.

En novembro 1928.

Varsovio.

Halina Weinsteinówna.

WACŁAW GRUBIŃSKI.

ŜI.

(Novelo).

Sinjoro Adamo saltis de la skribtablo.

— Ĝi estis — antaŭ tri jaroj — daŭrigis sinjoro Witoldo ŝutante singarde la sukeron en la varman, aroman kafon. — Venis Varsovion mia malproksima kuzineto, kiun mi preskaŭ ne konis. Belega. Hela blondulino, bluaj okuloj, dek ses jaroj, infano, la plej perfekta infano, kian mi iam vidis. Edukita en la vilaĝo, poste en monaĥinejo, vivemo de memvola knabo, malkonsekventeco de kaprica knabino, ridanta ĝojo de l' vivo, sportoj — ĉevalo, naĝado, aŭtomobilo — sopiro al fabeloj, nenio legita, intelektuale — kiel tion difini — netuŝita, pensanta sole per sia impulsa, senpeka temperamento infana.

— Sufiĉas, mia kara — ekridetis la maldika brunulo. — Tio jam estas la poezio, rigardata en la momento mem de bolado.

— Vi estas prava. Mi estis ĉarmita. La ĝepatroj donis al mi la zorgadon pri ŝi dum la tuta tago. Pri kio ajn mi parolis, ŝi auskultis kun granda intereso, dum kio starigadis al mi amason da demandoj, kiel sciema infano. Jam post unu horo de tiu libera kuna restado ni estis koraj denaskaj amikoj, feliĉaj pro nia amikeco. Ni interparolis pri ĉio, ĉio ŝin mirigis, tiun belan sportulinon, kiu kvazaŭ unuafoje en la vivo forturnis sin de la fizika mondo, atingebla al ŝiaj infanaj sentoj, kiaj kun admiro kunigita kun ioma nekredemo ekkonadis la miraklojn de l' inventa homa ĝenio. Ĉar nia interparolado ruliĝis en saltoj vere eksterordinaraj. Ekzemple de la ekkrio de mia ĉarma kunulino, ke ŝi ne ŝatas froston, ni venis al la konstato plene por ŝi nova, ke oni povas la aeron fluidigi. Ŝi alrigardis min serioze per siaj helaj okuloj kaj malkuraĝe demandis:

— Tiun ĉi venton oni povas fluidigi?

Ni temanĝis duope kaj poste por ripozi veturis per oportuna limuzino ekster la urbon. Preskaŭ ni ĉesis interparoli. Mian malgrandan amikinon ekregis laciĝo kaj venkis senceremonie posttagmeza dormo. Ŝi apogis la kapeton je la molaj kusenoj, mallevis la palpebrojn kaj ekdormis por dek minutoj. Mi alrigardis ŝin kortuŝite.

Ŝi malfermis la okulojn ripozita, refreŝigita, kaj tuj postulis, ke mi rakontu al ŝi ion. Prefere fabelon. Mi rakontis la novelon de Edgar Poe pri la nigra kato. Demandoj, rimarkoj kaj observoj estis senfinaj. Sed vespere en la teatro dum la prezentado de „Kamelia sinjorino“ de Dumas malgraŭ, ke la aktoroj ludis tre bone, ŝi ridis kvazaŭ dum farso kaj forirante diris:

— Stultajo.

Ni estis malsataj, tial por ne trudi la servistaron dum tiel malfrua horo iris vespermanĝi en Bristolo. Ni okupis tableton ĉe kolono, mendis manĝaĵojn, kaj mia kuzineto komencis ĉirkaŭrigardi.

— Ĉion ĉi faris la homo — mi diris.

— Kion? — ŝi demanidis.

— Ĉar pripensu nur, Ninjo, iam, antaŭe. Li manĝis krudan viandon, kiun li disŝiradis per la fingroj, havis nur unu lampon: la sunon, kaj unu kandelon: la lunon. Li ne povis tiun kandelon eklumigi laŭdezire kaj tiu lampo ne apartenis al li. Kaj nun rigardu, Ninjo. Ĉu tiu ĉi salono brile lumigita rememorigas malhelan kavernon de niaj prapatroj? Kaj tiuj sinjoroj en smokingoj kaj tiuj sinjorinoj tiel aromantaj, dekoltitaj, kun brilantoj en la oreloj, ĉu ili rememorigas la malpurajn homojn primitivajn, netonditajn, nerazitajn, nemanikuritajn? Tion ĉi ĉion faris la homo mem. La nokton li transformas je tago, kiam li deziras tion. Li kuras pli rapide ol la plej rapidaj ĉevaloj, ĉar li elpensis la fervojon kaj aŭtomobilon, flugas kiel la birdoj... enrigardas al si en la internon de l' korpo per la radioj de Roentgen...

Ninjo observis min atentege, kiam mi denobris longe, longe la pruvojn de neverŝajna elpensemo de l' homo. Mi finis:

— Ĉion ĉi faris la homoj. Senarmaj, nudaj, malfortaj. Pli senarmaj ol la leporo, ĉar ne havantaj ĝiajn rapidajn piedojn; pli malfortaj ol bovo, ĉevalo, eĉ azeno. Pripensu, kiel potencaj estas la homoj.

Enprofundiĝinta en tiuj pruvoj Ninjo diris alrigardante min serioze:

— Vi vidos, ke ili malkovros ankoraŭ Dion.

Malgraŭ ke mi observis Ninjon plenokule, en tiu momento kvazaŭ subite malfermiĝis miaj malfermitaj okuloj.

— Kion vi diras? — mi demandis konfuzite.

— Vi vidos — ŝi ripetis. — Ĉar se ili malkovris tian plej malfacilan certe aĵon kiel la aero... Vi vidos, ke ili malkovros Dion.

Ekregis min kortuŝo. En la koro mi sentis nedireblan sentemon al Ninjo. Mi deziris preni ŝin sur la manojn kiel infanon, alpremi al la brusto.

Mi renkontis la poezion.

El la pola lingvo tradukis
Br. Kuhl.

Al

ĉiuj niaj legantoj kaj amikoj

okaze de


Kristnasko

kaj

Jarŝanĝo

plej korajn bondezirojn sendas

„Pola Esperantisto“.



POLA KRISTNASKA KANTO.

Kristnaska antaŭvespero. Super la neĝokovrita tero ekbrilis la una stelo. En tiu momento kolektiĝas ĉiuj domanoj ĉe komuna tablo por rompante la oblaton esprimi reciprokajn bondezirojn. Ĉiuj en sincera konkordo kaj solena agordo komencas la vespermanĝon pripensante tiamon, kiam en la malproksima lando venis teren Dio-Infano benante la homojn de bona volo. Kaj post momento el profundo de koroj ekfluas ĉielen kanto de ĝojo kaj gajeco — la pola „kolendo“.

Fono kaj motivo de la kolendo estas Kristnasko kaj la bildon formas la pola vilaĝo kun ĉio, kio al ĝi apartenas. Tie estas decembra frosto kaj ŝafpeltoj, botoj kaj ĉapoj, diversaj domaj mebloj kaj provizoj. La popolo, kiu plejparte estis la verkinto de la kolendo, kantante pri la Nasko de Sinjoro Jezuo kaj pri Lia Patrino, transportis la polan vilaĝon en tiujn malproksimajn jarcentojn kaj landojn. Tiu folkloro koloreco donita al la Betlejemaj scenoj, tiel kara al ĉiu Polo-kristano, prezentas tutan ĉarmon de la kolenda naiveco; intimeco, simpleco kaj ia kortuŝo estas ilia beleco pli supera.


Kolendoj, verkoj de la popola poezio, ĉion, kion ili prikantas, prezentas simple en neafektaj vortoj. Kaj tiu ĉi naiva realismo karakterizanta la plejparton de kolendoj ne ridigas, sed kortuŝas kaj sentemigas. La vilaĝa vivo kun tuta pompo de siaspecaj koloroj libere kaj riĉe disvolviĝis en la polaj kolendoj. Tiu ĉi vivo iafoje tre pedante priskribita, tiu ĝi granda zorgo pri Novenaskito, granda sincereco, gastamo kaj bonkoreco, kun kiuj la simplaj homoj rilatas al Dio-Infano, devige alparolas profundon de animoj.

La lingvo de kolendoj estas neelektata, simplula, ĉar tian parolis iliaj kreintoj, tamen ĝi ne ofendetas; egalbone kaj similbele ĝi sonas en pajlokovrita kabano kiel en palaco magnata. Karakterize por la kolendoj estas, ke ili turnas ĉiam sian atenton al mizero kaj malriĉo, direktante per tio la homan penson al aliaj neteraj, ĉiam daŭraj valoroj. Do la plej malriĉaj en tiu ĉi belega harmonio de l' kolendoj trovas konsolon en siaj zorgoj kaj doloroj sinceraj atentante, ke Kristo ne en palaco, ne en oro kaj ŝkarlataj vestoj, sed en memvola mizero, malriĉo vivis kaj agis por alporti mildigon de l' suferanta homaro.

Populareco de l' kolendoj en la pola nacio estas eksterordinara. Ne ekzistas preskaŭ pola domo kristana, en kiu oni ne kantus kolendojn depost Kristnaska vespero ĝis la 2-a de februaro. Kaj tiun ĉi disvastiĝon la kolendoj ŝuldas interalie al sia melodio.

La melodio de l' kolendoj estas bazita sur popolaj motivoj; karakterizas ĝin ĝojo konforme al enhavo, kiun ili priskribas. La kolendoj estas eksterordinare belsonaj kaj melodiaj, pro tio ili facile memorebliĝas. Formo de la kolendoj, se temas pri melodio, estas duparta. Tempomezuro estas diversega kaj granda ĝia varieco estas karakteriza. Tamen plej ofte estas renkontataj mazurkoj, marŝoj kaj eĉ viglaj krakoviakoj. La kolendoj estis ofte prilaborataj de polaj muzikistoj kaj komponistoj. Chopin sur kolendo bavis unu el siaj etudoj. Pretigitaj por kelkaj voĉoj neunufoje la kolendoj konkiradis la korojn de eksterlandaj muzikamantoj kaj la svisa ĥoro: „Motet et Madrigal“ kantante polajn kolendojn en franca traduko kolektadis en la tuta mondo grandajn aplaŭdojn.


Tadeusz Hodakowski.



EL LA POLAJ KRISTNASKAJ KANTOJ.

DUM NOKT' MALLAŬTA ...

(Wśród nocnej ciszy...).



En nokt' mal-laŭ-ta voĉ'e-ten-di-ĝas, Plej ra-pi-de vin pre-pa-ru
Aŭ-du pa-ŝti-stoj' Di-o na-ski-ĝas,



Be-ĉle-je-mon vo-jon fa-ru Sa-lu-ti Di-on.

Dum nokt' mallaŭta voĉ' etendiĝas:
 Aŭdu paŝtistoj: Dio naskiĝas,
 Plej rapide vin preparu,
 Betlejemon vojon faru,
 Saluti Dion.


Paŝtistoj iris, Infanon trovis,
 Kiun laŭ signoj ekkoni povis,
 Kiel Dion Lin adoris
 Kaj per saluto honoris
 Kun granda ĝojo:

Estu, Savanto, bonsalutata,
 De kvarmil jaroj jam atendata,
 Cin patriarkoj kaj reĝoj,
 Profetoj en pIAj preĝoj
 Tre sopiradis.

Kaj ni atendas Cin, ho Sinjoro,
 Dum mescelebro kun pia koro:
 Sub form' de vino kaj pano
 Ni adoras Cin, Infano,
 Genuiĝintaj.

EN TAG' DE NASKIĜO DIA...

(W dzień Bożego narodzenia...).



En tag de na-ski-ĝo Di-a Ĝo-ĵe-gas kre-a - ĵo ĉi - a: Bir-de-toj su-



prenflu-ga-das, Al Je-zu - o al-kan-ta-das, Al-kan-ta-das.

En tag' de naskiĝo Dia
 Ĝojegas kreaĵo ĉia:
 Birdetoj suprenflugadas,
 Al Jezuo alkantadas,
 Alkantadas.

Najtingal' kantas sopranon,
 Kardel' aldan akompanon
 Sturn' tenore krias pase
 Kaj kolombo kveras base,
 Kveras base.

Kaj ni kun paŝtistoj kune
 Niajn korojn donas nune
 Al Dio enkarnigita
 Hodiaŭ al ni naskita,
 Jen naskita.

Benu nin Jezuo nia,
 En vivomomento ĉia,
 Benu per sankta virtaro,
 Benu per la vivbonaro,
 Vivbonaro.

El la pola lingvo tradukis
 Władysław Trzeciak.

DE KIE DEVENAS LA KUTIMO ORNAMI LA KRISTNASKAN ABION.

(laŭ rakonto de Tatra'a montarano).

Vi diras, sinjorino, ke Betlejemo, kie Sinjor' Jezuo naskiĝis, ie malproksime estas trans maroj? Nu, mi ne scias, sed mia avo rakontis kaj li tion aŭdis de sia avo, ke Sinjor' Jezuo en Tatroj naskiĝis, ĉar kiel ja estus la paŝtistoj irintaj tiom malproksimen saluti lin? Nur mi bone ne memoras, ĉu tio estis en Chochołów, ĉu en Witów, ĉu en Rogoźnik, sed ĉiuokaze en Tatroj. Kaj vi devas scii, ke kiam Sinjor' Jezuo naskiĝis, ĉio vivinta, tiel la homoj, kiel ankaŭ ĉiu bruto iris la Infaneton saluti kaj kion ĉiu havis, oni portis kiel donacon. Aŭdis ankaŭ la urso pri tiu novaĵo, volis ankaŭ Jezučjon vidi, sed diris al sia edzino-ursino:

— Nu kiel mi iros, se mi ne havas ion por donaci al la Infaneto. Eble mi kantu al Li, kiom mi scias?

— Vidu, ha, kia muzikisto — diris la ursino — ci deziras, ke la Infaneto timiĝu kaj sankta Jozefo cin per bastono ŝmiru?

— Nu do mi saltos kelkfoje, por ke Jezučjo ekĝoju.

— Ho! maljuna ci estas kaj tamen stulta. Ĉu ci ne aŭdis, kiel la anĝeloj kantadis, ke en mizera staletto li naskiĝis? Ci disrompos la stalon kaj faros embarason anstataŭ plezuron. Sed sciu, kion mi konsilas al ci. Iru arbaron, trovu belforman abion kaj portu al la Infaneto kaj diru, ke ci ne havis ion pli bonan por donaci.

Nu do iris la urso, kiel la edzino ordonis, trovis belan abion, rompis ĝin kaj portis. Ĉar tamen peza estis la arbusto, li ne povis ĝin porti, sed trenis post si. Kaj ĉar li devis kelkajn riveretojn trapasi, do en ĉiu la arbusto trempiĝis kaj poste tuj glaciĝis, nu kaj fariĝis sur ĝi belegaj vitraj pingletoj kaj la abio en la suno brilis kvazaŭ ĝin oni per diamantoj estus priŝutinta. Plaĉis tio al la fiŝetoj kaj ili saltis sur la arbeton. Kaj kiam ankoraŭ dumvoje la birdetoj tiajn belajojn ekvidis, tuj ili sidiĝis sur la abio kaj la urso ĉion ĉi kune alportis al la staletto kaj starigis antaŭ la Infaneto.

Ho! Kiel ekĝojis Jezučjo, kiel Li plaŭdetis per la manetoj! Eĉ la Plej Sankta Virgulino kaj sankta Jozefo komencis rideti kaj kore dankis al la urso. Kaj kiam la urso revenis en sian budon, li fieregis, ke lia donaco tiel plaĉis al Jezučjo.

Nu do vi vidas sinjorino, de tio devenas, ke oni nun ornamas por la infanoj la arbeton dum Kristnasko kaj diversajn brilornamojn sur ĝi pendigas.

Transskribis
Anna Dobrzycka.

ESPERANTISTA VIVO EN PARIZO.

(daŭrigota)

Je la 10 horo oni forlasas la Sorbonne, kaj granda parto de la kunvenintoj ekmarŝas pogrube, sen standardoj aŭ tamburo, al proksima „Café Cluny“, ĉe angulo de boulevard St. Germain kaj bd. St. Michel. Tie aperas glasoj de kafo, de biero, pli malgrandaj, sed malpli sendanĝeraj por la sano ĝlasetoj — kaj oni babilas tre agrable en la „rondo familia“, kelkaj ĝis noktomezo. Neordinaraj tamen familianoj apud tiu tablovico. Jen, So Arnould, simpatia Rumano, saĝa propagandisto kaj bona ŝakludanto — parolas kun Sino Sampson-Major, Anglino edziniginta je Hungaro. Jen lia ĉarma edzino babilas (ĉu france?) kun Sino Jeannette, filino de vicprezidanto Le Cornec. Jen Salo Grenkamp, homo kiu bele kantas, deklamas kaj kunportas ĉiam iom da salo en niajn kunvenojn, Polo, poeto, L. K.-ano — klarigas ion pri la pola folkloro al juna, blonda Estono. Jen Ruso Aisberg-Glacimonto, premiita novelisto, aplaŭdata humoristo, duma siaj perditaj momentoj ankaŭ radiisto — vikle tamen diskutas kun Henri Selves projekton de nova radioaparato, kiu funkcios sen lampoj aŭ galeno. Jen Jean Marchand, vicsekretario de la Grupo, kiu, malgraŭ siaj dudek jaroj, konas nian vortaron kaj nian gramatikon kiel tre maloftaj grizharuloj, kaj ŝatas bonajn statutojn — ŝajne disputetas pri iu regulara punkto kun Joseph Nels, lerta sekretario de la Federacio de la Pariza Regiono, sekretario de la „Verda Kato“, Franca civitano naskita en Polujo, kiu, malgraŭ sia nuna kvalito, forgesis nek polan lingvon, nek polan koron. Jen Japana oomotano, Niŝimura, klarigas serioze la utilecon de l' unuigo de religioj al Bulgaro Ĝuĝev. Jen alia Japano, So Hasegaŭa, gradigito de la imperiestra Tokia universitato, ridas afable al demandoj, kiujn faras al li Ĉeĥoslovakio Papeŝ. Jen Italo Pistone legas mallaŭte sian lastan versaĵon al Germana studento kaj Holanda fraŭlino. — Ekzemplero de malgranda homaro, en kiu, verdire, mankas ankoraŭ Negroj kaj Ruĝhaŭtuloj. Sed tio dependas nur de hazardo...

Ĉiun duan aŭ trian monaton (antaŭ la milito ĉiumonate), la Pariza Grupo aranĝas la „Vespermanĝon de la Dekdua“, tiel nomatan, ĉar ĝi okazas sensanĝe la 12an tagon de l' monato. Tiuj festenoj, dum kiuj oni bone manĝas kaj trinkas bonan vinon, kaj poste aŭskultas kanton kaj muzikon, kaj ofte ankaŭ bone dancas, havas krome specialan propagandan celon: la Grupo invitas al ili unu aŭ kelkajn personojn influajn kaj Esperantigindajn. Oni ja scias, ke plej facile estas konvinki iun ĉe bona manĝo, precipe tia, kiun li ne pagos kare. Des pli, se la konvinkantoj estas talentaj, la argumentoj kaj la tostoj lertoj kaj spritaj. Ni esperu, ke ĉiu el tiuj gastoj konservos bonan rememoron pri momentoj pasigitaj inter Esperantistoj, kaj sekve pri Esperanto: direktoro de la parizaj telefonoj, prezidantino de la porvirinrajta ligo, senatanoj, urbaj konsilantoj, ĵurnalistoj francaj kaj eksterlandaj... Enskribojn kolektas la sekretario, la prezo por ne-gastoj estis lasttempe 15 fr. fr.

Sed en Parizo agas ne nur la „Pariza Grupo“, tie ankaŭ agas la „Verda Kato“. Ve, mi ne konis ĝin dum la epoko, kiam en ĝia agado partoprenis ĉarma poeto kaj ĉarma aktoro, Raymond Schwartz. La verdkatanoj kolektiĝas ĉiumerkrede en trankvila kafejo, strato Nôtre-Dame-de-Bonne-Nouvelle. Oni trinkas glasojn, fumas pipojn, parolas, ŝakludas, faras „provojn“. Kelkfoje dum la jaro okazas la prezentadoj. Unua parto: kanzonoj, versaĵoj, monologoj. Lasttempe la „Verda Kato“ perdis, bedaŭrinde, la agrablan lirikan talenton de So Paul Echard, foririnta Grekujon. Soj Le Cornec, Nels, Marchand verkas malmulte, sed tre taŭge. Salo Grenkamp delonge jam rajdas Pegazon. Spritajn monologojn de So Laval oni povus aŭskulti kun pli granda plezurĉ, se li prononcus iom pli laŭte. Sed neniu, certe, faros tiun rimarkon koncerne la fortikan, belan bason de tre simpatia So Barrier. La ĉefa parto de la spektaklo estas teatra prezentado. Oni tradukas el la franca lingvo. Precipe el Courteline. Elekto bona, kaj ludo bona. Tradukoj de So Marchand eksterordinaraj. Kiom la Esperanta publiko estas avida je vivanta Esperanta vorto, tion pravas la ĉiam plena salono. Ĉie, en ĉiu Esperanta centro, kie ne estas ebla bona originala Esperanta kabareto, oni devus almenaŭ krei Esperantan teatron!

